

## **PROGRAMO « UNU LECIONO PRI ESPERANTO POR ĈIU LERNEJANO EN LA TUTA MONDO »**

**Louis Lu Wunsch Rolshoven anoncas :**

Saluton!

Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis popularigi la ideon, ke antaŭ instruado de Esperanto en lernejoj plej bone oni unue informu multajn lernejanonjn \_pri\_ Esperanto kaj ĝia hodiaŭa uzado - dum unu aŭ du lecionoj. Tiucele mi lanĉis la agadon "Unu leciono pri Esperanto" por lernejanonj. Komprenoble mi longavide ŝatus, ke ĉiu lernejanon en la mondo havu tian lecionon - sed mi ja tre konscias, ke tia celo daŭros ankoraŭ iom... :)

Klaus Friese el Hamburgo, pensiiĝinta instruisto, verkis etan broŝuron pri la temo, en iu mi kunlaboris. Intertempe la broŝuro ekzistas en ses lingvoj (Esperanto, franca, angla, itala, germana, turka). Elŝuteblas sur <http://esperanto-klaus.de/> (serĉu "leciono").  
Pliaj tradukoj komprenoble treee bonvenas :)

Mireille Grosjean tre afable subtenas la agadon ĉe ILEI kaj metis multan materialon sur la ILEI-paĝon <https://www.ilei.info/agado/projektoj.php>  
Ŝi ankaŭ verkis pri la agado en la Ondo de Esperanto <http://sezonoj.ru/2017/05/ilei-13/>

Brila kampanjo por "Unu leciono" en Rusio

Dum septembro kaj oktobro rusaj aktivuloj sub gvido de Irina Gonĉarova nun realigis brilan kampanjon por "Unu leciono pri Esperanto" kun grandioza sukceso: 12 homoj instruis, ili prezentis sume 27 lecionojn pri Esperanto en 15 klerigejoj. Ĉeestis entute 666 lernejanonj de la 5-a ĝis la 11-a klaso kaj aldone studentoj aĝaj ĝis 21 jaroj. Admirindege :)

Jen ekzemplodona agado, kiu bonege funkciis :)

Grandan gratulon al la gvidantino de la projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj" en Rusio, Irina Gonĉarova, kaj al ĉiuj kunagantoj:

Aleksandr Blinov, 17-jara Dmitrij Timin, 16-jara Matvej Blinov, Ivan Sarkisov, Artemij Cirkovskij, Viktor Lagutin, 15-jara Roman Ralko, Dmitrij Ĵuravljev, Jelena Kuznecova, Eŭgeno Bojĉin, Ikar Akimenko.

Sube artikolo pri la sukcesa kampanjo en Rusio el La Ondo de Esperanto, 2019, N-ro 11, p. 27-28

Mi tre ĝojas pri tiu bela paso antaŭen :)

Eble en iuj aliaj landoj troviĝos ankaŭ aktivuloj, kiuj ŝatos survoĝigi similan kampanjon, ĉu?

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand, prezidanto

Germana Esperanto-Asocio, respondeculo pri gazetaro kaj publikaj rilatoj

Lu Wunsch- Rolshoven <lu.esperanto@gmx.de>

**Irina Gonĉarova anoncas :**

Ruslando: Unu leciono pri Esperanto por lernantoj

Antaŭ kelkaj jaroj ILEI alvokis la esperantistaron partopreni la projekton “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano en la tuta mondo”, proponitan de Klaus Friese el Germanio (<http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>). La ideo, klara el la titolo, estas nobla, sed aspektas utopia eĉ por eŭropaj landoj, malgraŭ kelkaj helpmaterialoj, proponataj de ILEI por realigi ĝin.

Kaptinte la esencon, REU penis adapti la projekton al la realo kaj la kondiĉoj de Rusio. Unuavice ni estingis la ambiciojn kaj rifuzis celi ĉiun lernanton de la lando. Aliflanke ni vastigis la aĝlimojn de la konsumantoj ĝis 21 jaroj, konsiderante ne nur lerneĵanojn, sed ankaŭ studentojn. Ni limigis la tempon de la projekto per du monatoj, komencantaj la studjaron. Konforme al tiuj ŝanĝoj la rusa versio de la projekto de ILEI/REU ricevis la nomon “Unu leciono pri Esperanto por lernantoj, septembro-oktobro 2019”. Do, la agado startis la 1an de septembro kaj finiĝis la 31an de oktobro 2019.

Estis farita granda laboro por klarigi la celojn kaj la gravecon de la projekto al esperantistoj kaj neesperantistoj, al spertuloj kaj novuloj, al aĝuloj kaj gejunuloj. Estis bezonataj konstantaj konsultoj, kreo de retresurso kun materialo, uzebla por la prelegoj, inspirado de hezitantaj, akirado de regula raportado, skrupula analizado de lokaj situacioj kaj resumo de la rezultoj. Nun ni povas prezenti tiujn.

Jen la ĝenerala statistiko: 12 instruantoj faris 27 lecionojn de Esperanto en 15 klerigejoj de naŭ urboj, sume por 666 lernantoj de la 5-11aj klasoj kaj studentoj aĝaj ĝis 21 jaroj.

Diverse reprezentigiĝis ses el ok rusiaj federaciaj regionoj (ne partoprenis Nord-Kaŭkazio kaj Uralo): de unu leciono en Nord-Okcidento, Siberio kaj Fororiento tra du en Sudo kaj kvar en Centro al 18 en Volgio. Pli detale: en Ĉeboksaro okazis 17 prezentoj por 408 lerneĵanoj kaj studentoj, en Samaro – unu kun 28 lerneĵanoj.

Ne mirindas, ke en tiu ĉi agado avangardas Ĉeboksaro. Aleksandr Blinov dum ĉ. 30 jaroj senlace kaj seninterrompe popularigas Esperanton en la urbo kaj en Ĉuvaŝio, kaj dum 25 jaroj – de sur la podioj de la Lingva Festivalo por miloj da gejunuloj. Eblas kun certeco diri, ke danke al liaj entuziasmo kaj kapablo inteligente kunlabori kun la ŝtataj strukturoj, Ĉuvaŝio estas tereno, la plej malferma al Esperantaj iniciatoj kaj do la plej Esperante informita en la tuta lando. Ne hazarde ĝuste ĉi tie, apud Aleksandro, elkreskis alia fortegulo – la 17-jara 11-klasano Dmitrij Timin, kiu okazigis 14 prezentaĵojn en kvar lernejoj por 315 lerneĵanoj. Ni aplaŭdu ankaŭ al la 16-jara 10-klasano Matvej Blinov, kiu kuraĝis debuti antaŭ 28 sepklasanoj.

Partopreno de junularo estas grava kaj ĝojiga. La unua hirundo estis la 25-jara MASlano Ivan Sarkisov (Moskvo), kiu malfermis la projekton, prezentinte Esperanton en la moskva mezlernejo “Intelektulo”. Artemij Cirkovskij (24 j.) prelegis al studentoj-filologoj de sia universitato ITMO en Sankt-Peterburgo, Viktor Lagutin (26 j.) raportis en Fororienta ŝtata scienca biblioteko en Ĥabarovsk. Kaj al teamo de lerneĵanoj fine de oktobro aldoniĝas la plej juna populariganto – la 15-jara MASlano Roman Ralko (Moskvo). Kiel ponto inter la junuloj kaj spertuloj staras novulo, la 37-jara MASlano Dmitrij Ĵuravljov (Volgograd). Kaj nun – la brava malnova gvardio: Aleksandr Blinov (Ĉeboksaro), Jelena Kuznecova (Samara), Eŭgeno Bojĉin (Ĥabarovsk), Ikar Akimenko (Barnaul) kaj Irina Gonĉarova (Moskvo).

Ni ŝatus rigardi la projekton en 2019 kiel provon. Ĉi tiu provo montris la vivkapablon de la ideo en Rusio. Ni vidas vojojn evoluigi la aferon. Kun singardo ni povas esperi pli da sukceso en la sekva jaro, kiam ni havos apogon sur la akirita sperto. Tra la tuta jaro kontinue funkcios la grupo “Informu!” (<https://vk.com/informado>) en la socia reto “VKontakte”, startigita la 1an de septembro por helpi “Unu lecionon...”. Sur la muro kaj en la diskutejoj de la grupo akumuliĝis nia sperto de 2019 kaj helpmaterialo por popularaj prelegoj pri Esperanto. Niaj junuloj kaj novuloj eksentis guston de la unuaj sukcesoj elpaŝi pri Esperanto antaŭ publiko. Vicas aliaj, kiuj

ankoraŭ ne kuraĝis aŭ organize ne sukcesis eniri la striktajn tempolimojn de la projekto. Estas bonaj perspektivoj por popularigo de Esperanto inter gejunuloj. Necesas nur labori, labori kaj labori...

Irina Gončarova  
respondeculo de REU pri ekstera informado  
gvidanto de la projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj"  
administranto de la VK-grupo "Informu!"  
kunordiganto de MEA MASI

[mirinda.strigo@gmail.com](mailto:mirinda.strigo@gmail.com)

**Klaus Friese anoncas :**

1. Traduku niajn broŝurojn por havi materialon en via loka lingvo.
  2. Serĉu multajn aktivulojn, kiuj portas la broŝurojn al la lernejoj.
- Bonan sukceson!

**Mireille Grosjean konkludas :**

Kompreneble la rilatoj kun la lernejoj kaj la edukministroj estas malsamaj en diversaj landoj. La strategio de Lu kaj ILEI konsistas el kontakto sen interveno de iu esperantisto. Ŝajnas, ke tio ne konvenas en Rusio. Pro tio Irina Goncarova lanĉis alian strategion kaj sugestas vizitojn de esperantistoj en la lernejoj. Ilia entuziasmo kreu, veku lernemulojn. Laŭ tio vi, kara leganto, pripensu, kiu strategio konvenas al via lando, al viaj kutimoj. Laŭ miaj scio kaj observoj en Svislando kaj supozeble en okcidenta Eŭropo ni preferas aŭdi faktojn ol aŭskulti ardajn entuziasmulojn. Faktoj efikas, entuziasmo tedas. Mi legis ie: Entuziasmo estas la armilo de malfortulo.

Racie prezenti faktojn efikas pli ol rakonti vigle kaj ripeteme siajn kontaktojn kaj vojaĝojn. Memoru la konsilojn kaj atentigojn de Germain Pirlot, kiu luktas en Belgio por nia ideo. Denove ni devas konfesi, ke tia analizo povas esti malsama laŭ la landoj kaj kulturoj. Do denove, kara leganto, vi elektu taŭgan strategion gardante en via kapo la bazan principon: mi adaptiĝu al mia celpubliko.

Mireille Grosjean mirejo.mireille@gmail.com